


64-a jaro n-ro 181 2023:3

la

lampiro



**Artefarita
artikolo**

Kulturkunveno

Esperanto Asocio de San Paulo

Prelego de

Gilberto Morelli

Aĵoj de Giba

Kanalo pri logiko kaj rezono



24^a - junio, 2023

16^a hora

en la sidejo de EASP

R.Faustolo, 124 - Água Branca, São Paulo

Estu bonvena!

Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**
Por paca kontribuo
- 5 | **Vortoj de la prezidanto**
Ĉeestaj kulturkunvenoj
- 6 | **Aktuale I**
Artefarita artikolo
- 9 | **Aktuale II**
Artefarita Intelektu kaj la estonteco de homaro
- 10 | **Kino kaj aliaj artoj**
Mulholland Strato
- 12 | **Iom da filozofio**
Filozofio antaŭ senorienta homaro
- 14 | **El mia instruista vivo**
Pedagogio de scienco
- 16 | **Recenzo**
Por la milito!
- 18 | **Nekrologo**
La movado funebras
- 19 | **Por iom mediti**
Feliĉo
- 20 | **El mia ĉiutaga vivo**
Akvo kaj sano
- 22 | **Iom da Gramatiko**
Lingvaj Respondoj de Francisco S. Welchsler

la lampiro

64-a jaro n-ro 181 2023:3

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima
Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf
Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues
Kasisto: José R. Tenorio da Silvas

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2023

Simpla Membro	R\$ 200,00
Subtena Membro	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro	R\$ 100,00

Porpaca kontribuo

En ĉi tiu numero de nia revuo oni povas legi du artikolojn pri la sama temo — pri “Artefarita Intelektio”. Ĝi estas nuntempe furora temo en la tuta mondo, kaj Esperantistoj kompreneble estas atentaj pri niaj modernaĵoj. Plej diversaj opinioj kaj analizoj estas legeblaj pri A.I., en ĵurnaloj, revuoj kaj interreto. Iuj homoj entuziasme akceptas tiun teknologiaĵon kiel mirindaĵon, aliaj timas, ke ĝi damaĝos la homan kulturon konstruitan dum jarmiloj; ankoraŭ aliaj konsideras, ke ĝi estos tia, kia la homo ĝin faros kaj uzos.

Tamen, ŝajne preskaŭ ĉiuj konsentas, ke ĝi venis en la mondon en maniero nekonstruŝtarebla. Ne eblos perforte kontraŭi ĝin. Restas la alternativo uzi ĝin prudente.

Jen do bela ekzemplo de la signifo de nia bulteno: instigo al pripensado pri nia moderna mondo, pri nia kul-



turo, pri nia interhoma kunvivado. Tiusence, nia lingvo havas privilegian statuson, ĉar nia Esperanta kulturo estas nutrata per altaj homaj valoroj, kiel toleremo, malfermeo de spiritoj, scivolemo pri aliulaj opinioj, kaj precipe pacemo.

Persone, mi pensas, ke A.I. povas kontribui al pli paca mondo, depende de ĝiaj uzantoj.

Kion vi pensas pri tio, kara leganto?

Paulo Sergio Viana

Ĉeestaj kulturkunvenoj

Saluton, karaj geamikoj!

Kun granda plezuro mi reskribas al vi pri mia kontentiĝo, ke nia asocio plu malfermiĝas al vi.

Ni jam invitis vin al nia sidejo por amika babilado. Ni jam invitis vin al kulturaj ekskursoj en la ĉefurbo San-Paŭlo, gvide de niaj kunlaborantoj Cristina Graaf kaj Wilian Gomes. Ni petas vin apogi ĉi tiun valoran iniciaton!



Ankaŭ al la estimataj kunlaborantoj de nia revuo La Lampiro ni ŝuldas grandan dankon. Nia redaktoro klopodas produkti bonajn legaĵojn, same kiel publikaĵojn en nia kanalo en jutubo. Bonvolu ĝui kaj diskonigi tiun materialon!

Ni krome bezonas kunlaborantojn, kiuj frekventu kaj laboru en nia sidejo por ĉeestaj programeroj. Ĉu vi pretas helpi nian asocion?

Laste, mi petas, ke vi laŭeble alvenu al nia sidejo por niaj kulturkunvenoj, ĉiam en la lasta sabato de ĉiu monato. Interalie, okazas tiam interesaj, klerigaj prelegoj en amika etoso.

Dankon, karaj, kaj estu bonvenaj!

Esmeraldo Aparecido de Alencar

Artefarita artikolo

Laŭ PIV, *artefarita* signifas “arta”, kiu siavice signifas 1. *Farita per homa arto, kaj ne devenanta simple de la naturo.*

Artefarita intelekto (AI) ekfuroris antaŭ monatoj. La febro daŭras. Mi mem en Esperantista medio konatiĝis kun la afero hazarde, eble en Fejsbuko, kiam iu afiŝis pri *artefarita intelekto* kun kiu oni povas interparoli ankaŭ en Esperanto. Temis pri *ChatGPT*, kiun, antaŭ kelkaj tagoj, Jorge Camacho nomis *parolroboto* kaj Murilo Gun¹ eknomis *Ĝepeto* (GePeTo, en la portugala). Ĉarmas ankaŭ la vorto *babelroboto* (kiun mi mem uzas). La brazila gazeto *Superinteressante*² ĉefartikolis pri la temo en sia februara numero kaj multe pli kompetente ol mi povos klarigi al vi pri tio, kiel tiu nenova (ni diru tuj) teknikaĵo funkcias. Eĉ al *ChatGPT* mem vi povas demandi, ĝi estas babelroboto, ĉu? Simple vizitu ties retpaĝon (chat.openai.com) kaj kreu senpagan konton. Per ĉi tiu artikoleto mi celas ja partodoni tion, kion mi lastatempe lernis pri efektiva uzado de la servo.



Post elementaj provoj, baraktoj kaj frustriĝoj, mi finfine trovis tre valorajn trukojn, afiŝitajn de Rony Meisler³, en Instagramo. Li estas kunfondinto de la brazila vestomarko *Reserva*.


Kompreneble oni povas simple demandi la roboton, kiel efike uzi ties helpon, kaj ĝi mem diros ion. Tamen la sukcesa sperto de uzantoj utilas, ĉu? Jen kion interalie instruas Rony:

Vizitu la retpaĝon de Ĝepeto kaj skribu:

1. Mi ankoraŭ ne decidis, ĉu mi **[aldonu tion, pri kio vi ankoraŭ ne decidis]**. Listigu *porojn* kaj *malporojn*, kiuj helpos min findecidi.
2. Nuntempe mi lernas **[aldonu tion, kion vi lernas]**. Elprovu miajn konojn per demandoj. Identigu malfirmajn elementojn en miaj respondoj kaj donu mem pli trafajn respondojn, kiuj kompensas la mankojn el la respondoj, kiujn mi donis.
3. Mi deziras lerni **[aldonu tion, kion vi volas lerni]**. Ellaboru tridektagan planon, kiu helpos min lerni tion kiel tutkomencanto.
4. Mi deziras lerni pri **[aldonu la temon]**. Identigu kaj listigu la plej gravan, dudek-elcentan parton, kiu helpos min lerni okdek elcentojn de la dirita temo.
5. Resumu la malsupran tekston en maksimume 500 vortojn. Listigu la plej gravajn punktojn kaj aldonu klarigan tekston pri ĉiu el ili.
6. Vi estas AI ellaborita por helpi **[aldonu profesion]**. Listigu la dek plej bonajn instrukciojn⁴ per kiuj mi

povus instrukcii vin. La instrukcioj devas temi pri **[aldonu temon]**.

7. Reverku la malsupran tekston faciligante la komprenon al tutkomencanto: **[aldoni la tekston]**
8. Mi estas intervjuota, por laborposteno kiel **[aldonu la oficon, okupon]**. Starigu al mi ampleksan liston de probablaj demandoj, kiujn mi respondus dum la intervjuo. Krome koncize respondu mem al ili.
9. Reviziu mian tekston. Korektu gramatikajn kaj ortografiajn erarojn kaj diru, kio en ĝi ne estas sufiĉe klara: **[aldonu la tekston]**
10. Dividu la malsupran tekston je malpli longaj, pli facile kompreneblaj partoj. Uzu analogiojn kaj konkretajn ekzemplojn, por simpligi la konceptojn kaj igi ilin pli kompreneblaj: **[aldonu la tekston]**



Kompreneble vi povos ĉion ĉi demandi Esperante. En la maja numero de la revuo Esperanto, la fakulo Martin Rue, intervjuite de la redaktorino Anna Striganova, asertis ke “iusence, jes, ĝi [ChatGPT] spertas pri verkado en Esperanto”. Proprasperte, originala teksto, verkita de ChatGPT mem estas lingve pli neta, ol la rezulto de tradukopetoj al ĝi. Malgraŭ tio, estas nekontesteble ke ĝia kapablo verki en Esperanto kaj

en naciaj lingvoj ankoraŭ ne identas. Tio ne signifas, ke Esperantistoj ne povos profiti. Tute male. La kampo estas eksterordinare vastega, precipe ĉar ChatGPT ne estas la sola babil-robototo, kaj... ĉar ekzistas ne nur babilaj robototoj. Ek!

PS: Jes, tiun ĉi artikolon verkis homo.


Leandro Abrahão

1 <https://www.instagram.com/murilogun>

2 <https://super.abril.com.br/tecnologia/o-futuro-da-inteligencia-artificial-e-o-que-vem-depois-do-chatgpt>

3 <https://www.instagram.com/rony>

4 Originale prompt, prompts



Artefarita Intelekto kaj la estonteco de homaro

Ni ĉiuj scias, ke la teknologio tre disvolviĝas lastatempe. Pluraj landoj investas verajn monamasojn en esploroj, kaj unu el la kampoj de pli intensa disvolviĝo estas la artefarita intelekto.


Scenoj, kiuj antaŭe nur aperis en sciencfikciaj libroj kaj filmoj estas nun ordinaraj en la ĉiutaga vivo en diversaj lokoj de la mondo. Intelligentaj robotoj plenumas taskojn rapide kaj efike, anstataŭante grandan nombron da laboristoj.

Tio faras multajn homojn demandi sin, kien povas alveni la inteligenteco de la maŝinoj. Kelkaj el tiuj homoj ekvidas momenton, kiam la robotoj iĝos pli intelligentaj ol ni, kio havus neantaŭvideblajn sekvojn. Aliaj homoj zorgas pri ebla malbona uzo de artefarita intelekto, fare de individuoj kaj/aŭ estraroj.

Ĉi-ĉio igas necesa la aprobon de leĝoj, kiuj reguligos ĉi-tiun kampon,

kaj la gvatadon de socio por ke la menciitaj leĝoj estu obeitaj.

Luís Euclides dos Santos



Mulholland Strato

Originala titolo: The Mulholland Drive

Direktoro: David Lynch

Aktoroj; Naomi Watts, Laura Harring kaj Justin Theroux

Lanĉo en Brazilo: 17.05.2002

Lando: Usono

Tempodaŭro 2h 27min

Antaŭ nelonge mi ekkonis tre interesan kinreĝisoron, kiu nomiĝas David Lynch. Li pli malpli famiĝis kun la televidserio “Twin Peaks”, kiu alvokis atenton de multaj homoj per sia efekta frazo: “Kiu mortigis Laura Palmer?...” Sed, ĉi-foje mi intencas paroli al vi pri lia filmo “La Mulholland strato”.

Ne eblas, tamen, paroli pri iu filmo de Davis Lynch... sen paroli pri David Lynch. Li naskiĝis en Missoula, je la 20-a de januaro 1946. Unue lia emo estis studi pentrarton kaj li eĉ eniris en Universitaton pri “Belaj Artoj”, sed lia vojo turniĝis al “Kinarto”, produktante kelkajn etajn filmojn kaj fine sian unuan grandan filmon “Skrapguma Kapo” aŭ “Eraserhead”.



Kun grandega kliniĝo al bizareco, superrealo, sonĝoj, mistero kaj kafo, David disvolvis sian propran stilon kiu estas nomata “Lyncheca”. Liaj filmoj havas sian propran rapidecon, tio estas, la aferoj ne okazas tiel rapide kiel en normalaj filmoj nuntempaj. Se io okazas en unu tago, la tempo en

filmo, ĝi sentiĝas kiel se ĉio ja okazis dum tiu tago.

Ankaŭ ĉio kio estas en la filmo havas kialon – la koloroj, la frazoj, la sonoj, ĉiuj detaloj estas gravaj. Sen paroli pri la dialogoj, kiuj en Lynch estas io treege karakteriza pri kiel li mem parolas kaj vidas la mondon. Kiam oni spektas iun en liaj filmoj, estas kvazaŭ oni eniras en psikologian sonĝon kiu faras sencon se vi ne provas serĉi logikan sencon.

Pri la filmo, ĝi ekas kun akcidento kiu okazas ĝuste je Mulholland Strato. La knabino kiu estis en la akcidento, sukcesis kaŝiĝi en iu domo de sinjorino kiu estis for. Sed, parenco de la posedanto ekloĝos tie kaj alveninte, trovas ke iu stranga virino estas tie. Rimarkante ke la alveninto estas sen memoro pri si mem, ŝi decidas helpi.

La misteroj pligrandiĝas laŭ mal-kovroj pri kiu estas tiu virino en akcidento, kaj ĉio rilate al la personoj kaj situacioj envolvitaj kun ŝi. Inklude la helpemulinon. Mi ne volas multe pli malkaŝi ol tion – kio jam estas iom troa

- por ke via sperto dum la spektado de la filmo estu la plej bona kiu eblas.

Kuriozaĵo pri la filmo, estas ke ĝi celis esti ia daŭrigo de Twin Peaks. Kaj post multe da malfacilaĵoj por ĝin aprobi, ĝi fine estis aprobita – Sed, la direktoro havis nenion plu – ĉar ĉio uzita por la “provfilmeto” estis uzata kaj li ne vidis sencon pri la historio kiun li pensis realigi en la komenco. Tiam, kun la aproboj kaj nenio en la manoj, dum liaj kutimaj meditadoj, venis al lia kapo ĉio, kion li volis krei. Interese, ke li ja vivas kion li montras en siaj filmoj!

La filmo gajnis kaj estis indikita al pluraj premioj. Ĝi troveblas ĉe la apo de filmoj “Mubi”. Ĝi estas tre bona apo por strangaj, interesaj kaj neusonecaj filmoj. Se eblas al vi havi ankaŭ tiun ĉi apon, mi forte rekomendas. Mi esperas ke mi instigis vin spekti tiun ĉi filmon kaj koni iom pli pri tiu nekutima direktoro David Lynch kaj liaj aliaj filmoj. Bonan spektadon kaj ĝis la sekva filmo!

Anna Lobo de Carvalho



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Donaco bonvenas per PIX

59.995.476/0001-29

Filozofio antaŭ senorienta homaro

La tri metaforoj de Norberto Bobbio

Norberto Bobbio (1909-2004) estis itala filozofo, juristo kaj historiisto. En lia vasta verkaro, estas multaj interesaj tekstoj por tiuj, al kiuj plaĉas serioza pensado pri gravaj temoj.

Unu el liaj plej citataj artikoloj temas pri tri metaforoj kreitaj el bildoj elpensitaj de la aŭstra filozofo Ludwig Wittgenstein (1889-1951): “muŝo en botelo”, “fiŝo en reto” kaj “labirinto”.

Inter la diversaj interpretoj pri la signifoj de tiuj metaforoj, mi elektis tiun rilatantan al rolo de filozofo antaŭ senorienta homaro. Ni komprenu, ke “senorienta homaro” estas esprimo por atentigi, ke la homaro, kvankam ne estas perdita, ne iras laŭ la plej bona vojo. Kompreneble, tio signifas, ke iam ĝi povos perdiĝi kaj riski sian ekziston.



Ĉar la destino de la homaro estas inter la temoj de la filozofio, la filozofoj traktas ĝin kaj tion ili faras el vidpunktoj prezentitaj per tiuj metaforoj.

Unue, se por filozofo la homaro estas muŝo en botelo, li kredas sin kapabla montri al ĝi, ke la elirejo estas libera, ke ekzistas sekura vojo por eliri kaj flugi. Li estas certa pri tio, ke estas facile atingi la liberecon, tamen la homoj estas blindaj aŭ iel ajn ne kapablaj vidi aŭ kompreni tion.

Eĉ se la botelo estas malfermita, la muŝo flugas ĉiudirekte, karambolas kaj nur hazarde trovas la elirejon. Pro tio, la filozofo, kiu taksas la homaron el tiu vidpunkto, agas samtempe pesimisme kaj superece.


Due, se filozofo rigardas la homaron kiel fiŝon en reto, li ne kredas pri savo, ĉar ju pli la fiŝo baraktas, des pli ĝi kaptiĝas. Al filozofo kun tiu koncepto mankas espero, li ne pretendas gvidi kaj liaj vortoj esprimas kompaton kaj solidarecon.

Trie, povas esti, ke filozofo vidas la homaron en labirinto kaj krome li konstatas, ke ankaŭ li estas en tiu medio. Kiel ĉiuj aliaj, li scias, ke estas elirejo, tamen neniu scias, kie ĝi estas. Li estas certa, ke frue aŭ malfrue la

elirejo estos trovita kaj pretas doni sian helpon por tio. Ĉi tiu filozofo ne havas la malmodestecon de la unua, nek la senesperon de la dua. Li havas la esperon trovi kun la homaro la liberecon kaj la ĝustan vojon.

Esperable, pensante pri niaj nepoj, nia malliberejo estas nur labirinto kaj ne mankos esperplenaj kaj klarmensaj filozofoj por helpi nin trovi la elirejon.


José Mauro Progiante



Norberto Bobbio
(1909-2004)



Ludwig Wittgenstein
(1889-1951)



Pedagogio de sciencoj


Dum pli ol kvindek jaroj mi min demandas pri la fuĝado de stud(a/e)ntoj el lernado kaj komprenado de sciencoj en fundamenta kaj mezgrada lernejoj, konsekvence ankaŭ en universitatoj...

Delonge mi asertas ke matematiko fariĝis la kulpulo de tiu malfacileco prilabori aferojn ligitajn al kemio kaj fiziko, inter aliaj pli fakaj.

Nu, kiel toleri aŭdi senĉesan plendon pri malfacilo kompreni/lerni matematikon, se ĝi estas konsiderata la plej facila ero de sciencaro? Serĉante la kialon dum tiuj pli ol kvin jardekoj pri tiu malfacilo/timo, mi konvikiĝis ke la kialo estas ununura, nomata LINGVO...

Jen la klarigo al mia kredo, kiu certe meritas kritikojn kaj korektadon fare de iu kompetenta pedagogo...

Se vi demandas de iu stud(a,e)nto la difinon de “cirkonferenco” plej ofte vi aŭdos veran balbutadon kies rezulto estas fiaska respondo. Sed rimarku ke



por difini ion vi bezonas aliojn kiuj devas ankaŭ havi difinojn, multfoje starigante interesan ĉenon de vortoj kiuj devas esti konataj kaj bone komprenataj. Ekzemple: Signifo de “rapido”= rilato inter spaco trairata kaj tempo bezonata... Hmmm Kio estas “rilato”? Kio estas “spaco”? Kio estas “tempo”? Signifo de cirkonferenco: Aro de ĉiuj punktoj de ebena samdistancaj de iu fiksa punkto de tiu ebena... kion signifas “punkto”? Kion signifas “samdistanca”? kaj “ebeno”? Rimarku ke unue la demandoto devas bone scii la signifon de “Aro”(tutaĵo)...

Antaŭ kelkaj tagoj gepatroj de juna lernantino de fundamenta kurso portis

la filinon ĝis mia domo kaj petis helpi ŝin pri matematiko... simplaj “konsiloj” solvis ŝiajn problemojn... ŝi lernis kiel konsulti la vortaron en sia poŝtelefono.

Sen sufiĉa vortprovizo estos terur-aĵo kompreni la priskribon de problemoj kiuj estas plenaj de necesaj difinoj.

Aldone, komprenante ke “la vera ludo estas metaforo de la vivo” oni trovas en ĝi bonan rimedon por allogi la simpatian de lernantoj de sciencoj, komence je matematiko, ĉefe pro tio ke tiu lernanto oportunistas la uzon de pluraj sensorganoj: aŭdado, gustumado, tuŝado, vido, flarado kaj intuicio... La vera ludo, laŭ mia percepto estas vojo al kvara dimensio...



Aparte mi konscias ke Esperanto rolas ankaŭ kiel “vera ludo”, pro tio ke oni konstatis per scienca esplorado ke “tiuj kiuj lernas ĝin, plibonigas sian lernadon de matematiko”!

Valdemir Moreira



For la milito!

Verko: "La kapreolido Pirgo"

Aŭtoro: Anđelka Martić


Esperantigis: Josipa Katunar

Eldonis: "Grafokom" - Durdevac, 2011

Kroatio

Literaturo por infanoj kaj junuloj estas speciala branĉo de literaturo. Ŝajne facila branĉo, ĉar oni devas verki per simplaj frazoj, eviti komplikajn analizojn, esprimi rektajn pozitivajn mesaĝojn kaj ne tro longigi la tekston. Jen staras la miskompreno! Precize pro tio ne estas facile eviti banalon en tiaspeca literaturo. Infanoj ne amas banalon. Ili deziras ion, kio vere, profunde instigu ilin al novaj pensoj, novaj spertoj, novaj emocioj. For la enuo!

Krome, bona infanliteraturo estas tia, ke ankaŭ plenkreskulo ĝin ĝuas, kaj ĉi tio estas bona mezurilo por mezuri la talenton de la koncerna verkisto.



“Pirgo” estas eminente bela literaturo. En ĝi la aŭtoro ne traktas la leganton kompateme kaj protekteme. Temas pri kvinjara knabeto meze de milito — la milito inter partizanoj kaj faŝistoj, en Jugoslavio. La belaj pejzaĝoj kaj naturmedio miksiĝas kun la kruelo de la konflikto. Jam sur la unuaj paĝoj la leganto ricevas la krudan rakonton pri la morto de lia infana frateto pro bombado, inter la brakoj

mem de la patrino. Kaj pri la disiĝo inter li kaj lia patrino, kaj pri la kunvivado kun la partizanoj, kiuj ameme rilatas al li. Lia serioza, fidinda patro estas estro de tiu soldata grupo.

Terura bombado surprizas lin, kiam li promenas en arbaro proksima al la kabanaro. Tie li trovas kapreolidon, kies gepatrojn ĵus dispecigis eksploĉo. Tio alproksimigas la du infanojn: la knabon kaj la kapreolidon.

Ĉu oni povus imagi pli efikan mesaĝon kontraŭ la absurdo de militoj? Ĉu oni bezonus pli vervan argumentadon por paco en la mondo? Por junaj legantoj, “Pirgo” valoras pli ol mil pa-

roladoj favore al paco, en la mondaj parlamentoj.

La kunvivado de la du amiketoj tra la ceteraj paĝoj de la bela libro estas jen amuzaj, jen poeziecaj, jen eduke instruaj. La tuta rakonto fluas harmonie kaj bele, ĝis la fina ĉapitro, kiam la leganto apenaŭ sukcesas eviti, ke eta larmo ekfluu el unu okulo...

Belega libro, kiun mi neniam povus legi en mia denaska lingvo, la portugala. Mi finas la legadon kun sento de dankemo al la aŭtoro, al la tradukinto, al la eldonintoj. Pro la aktualeco de la temo, ĉiu Esperantisto devus legi kaj diskonigi ĝin!



eosp
Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

La fripongalerio de Kinkas Borba

 youtube.com/vivagazeto

Francisco Stefano Wechsler
Kampino | San-Paŭlo

17 junio 2023
16h (UTC-3)


La movado funebras

De kelkaj monatoj la brazila (kaj tutmonda) Esperantomovado funebras. Forpasis du grandeguloj en nia batalado por la venko de nia lingvo: José Passini kaj Giuseppe Grattapaglia.

Profesoro José Passini estis 97-jara kaj lasis belegan vivhistorion. En la fina parto de sia brila kariero kiel edukisto, li fariĝis rektoro en la Universitato de Juiz de Fora, en la ŝtato Minas Gerais. Li estis eminenta, tre aktiva Esperantisto, kaj prezidis Brazilan Esperanto-Ligon en tempo, kiam li devis repacigi nian movadon. Lia verko “Bilinguismo: utopia ou antibabel?” fariĝis klasikaĵo en nia literaturo. Li estis ankaŭ sincera, fervora spiritisto.

Inĝeniero Giuseppe Grattapaglia naskiĝis en Torino, en Italujo, en 1931, sed pasigis grandan parton de sia vivo en Brazilo. Ĉi tien li migris kun sia familio, por labori en la famekonata Bieno Bona Espero, en la brazila ŝtato Goiás. Tie dum jardekoj oni akceptis kaj edukis malriĉajn infanojn en belega socia agado. Li krome dumvive aktivis en la Esperantomovado, kune kun sia edzino, Úrsula. Modela, ekzemplodona

paro, kiu plialtigis la prestiĝon de Esperanto en la mondo. Omaĝe al tiuj du gigantoj, li plu agadu favore al Esperanto!



Prof. José Passini



Inĝ. Giuseppe Grattapaglia

Feliĉo

Ni estas sataj... sed ni estas apatiaj...

Ni estas nesoifantaj... sed ni estas indiferentaj...

Ni estas nelacaj... sed ni restas en komforta sinteno...

Ni spiras libere... sed ni daŭras senmovaj...

Ni vidas la florojn, la infanojn, la montaron, la aŭroron, la vesperkrepuskon, la senlacajn abeletojn, la arbojn, la bestojn kaj la birdojn... sed ni ne dankas... ke ni vidas!

Ni aŭdas la sonorilon, la kantadon, la prelegojn, la lecionojn, la aŭtomobilojn, la plendojn, la laŭdojn... sed ni ripensas ke ĉio estas simplaj faktoj...

Ni parolas, prezentante nian volon, ni prelegas, ni babiladas, ni krias, ni plendas... sed niaj vortoj konstruas nenion...

Ni tuŝas la petalojn de floroj, la vizaĝon de infano, la amikajn manojn... sed ni ne sentas la dian tuŝadon en nia vivo!

Ni kuras, ni promenas, ni moviĝas sur la Tero... sed kien?

Poste, ni plendas ĉar ni ne trovis la feliĉon!

Je, koncentriĝante nur en ni mem ni neniam trovos feliĉon! Ĉar nia feliĉo estas sur la manoj de niaj proksimuloj, en la rekonado de la dia ĉeestado en nia vivo!

Ĉu vi jam vivis spertojn pri tio? Bonvolu, skribu al la Lampiro pri viaj spertoj, lumigu aliajn vivojn!

João Otávio Veiga Rodrigues



Akvo kaj sano

En nia klubo de Esperanto, en Pasárgada, ni ĉiam lernas. Mi profitas la hodiaŭan okazon por rakonti kion mi lernis lastan sabaton, tute hazarde, kiam mi vizitis la sidejon por pruntepreni librojn.

Malmultaj estis tie, la bibliotekistino, la prezidanto kiu babiladas kun Blanketo, kaj s-ino Laŭra, la helpistino kiu venis por purigi la sidejon. Mi trovis ŝin antaŭ la krano, en la kuirejo, kies akvofiltrilo ne plu funkcias. La konversacio komenciĝis pri tiu problemo, pri kiu ŝi diris serioze, ke la afero devas estis solvita rapide, ĉar oni ne povas forgesi trinki akvon. Mi demandis al ŝi: Kial la afero estas tiel grava? La respondo surprizis min, kaj estis vera leciono. Ŝi diris: - Akvo estas beno de Dio. Iam, mia frato estis malsana, ni iris al medicinisto, kaj doktoro Viktor nin instruis kiel grave estas trinki akvon dum la tago.



Mia frato ne bonfartis, ĉar li estis senhidratigita. Pro tio, diris la medicinisto, li havis malpli da sangovolumo ol normale, pro manko de akvo la funkciado de la koro estis perturbita. Jes, li suferis pro kapturniĝo,

kapdoloro, kaj vivis tre laca dum la tago. Mia frato ne havis la kutimon trinki akvon, trinkadis nur industriajn refreŝigaĵojn, kiuj enhavas multe da sukero kaj ankaŭ malsanigas la korpon. Sciu kaj ne forgesu, karulino, – ŝi enfazis, – akvo, beno de Dio al ni, protektas nian koron, plifortigas nian imunsistemon, purigas nian orga-

nismon, plibonigas la intestfuncion kaj protektas la renojn. Trinku ĝin, ne forgesu! Ni devas trinki, precipe somere, pli malpli ĉiujn 2 horojn, ĉar oni ne devas trinki multe da akvo en mal-longa tempodaŭro, ĉar tio ankaŭ mal-ekvilibras la organismon.

Blanketo, kiu estis proksime kaj aŭdis nian konversacion, petis permeson, kaj parolis: – Vi tute pravas, Laŭra. Mi volas aldoni ion pli. La personoj kutime aĉetas tiujn akvobotelojn kaj kunportas kaj trinkas ilin dum la tago. Sed oni devas atenti pri la kvalito de la akvo aĉetita, por ke ĝi estu vere bona por ni. Unu el ili estas la mezuro de la acideco aŭ alkaleco de la akvo, konata kiel mezuro de PoHo. Valoroj de PoHo super 7 (ĝis 14) indikas pliiĝon de la grado de alkaleco kaj sub 7 (ĝis 0) pliiĝo de la grado de acideco. Do, kiam vi aĉetas akvon, atentu, la ideala PoHo, kiu devas varii inter 7 kaj 9,5, do akvo pli alkaleca. Alia grava punkto estas la kvanto da natrio en ĉi tiu akvo. Se la enboteligita akvo havas pli ol 200 mg da natrio en litro, ĝi povas damaĝi nian sanon. Tial, ni ĉiam devas observi la etiketon, gluitan sur la botelo, antaŭ ol elekti la aĉetotan akvobotelon, ĉar ĝi enhavas fundamentajn informojn pri la konsisto de la akvo, kiun ni trinkos.

Vere mi multe lernis kun miaj amikoj, sed la tempo foriras rapide. Blanketo tuj poste eliris, kaj Laŭra reiris al la laboro por fini la purigadon de nia sidejo. Mi prunteprenis miajn librojn, kaj pensis serioze pri la vortoj de Laŭra kaj Blanketo, ĉar mi ĉiam rigardis nur la limdaton de mineral-akvo aĉetita, sed ekde nun mi atentos pli la nutrajn informojn de la etikedo, kiuj informas pri la kvanto da nutraĵoj (kiel natrio, kalcio, magnezio, ktp.) en la minerala akvo kiun mi trinkos. Kaj mi konsilas al vi, kara leganto, faru ankaŭ tion. Lernu pli, esploru pli bone tiun aferon, ĉar por nia sano ni bezonas akvon, sed ne forgesu, ĝi devas esti bona akvo.

David Bianchini

davidesperantista@gmail.com



Lingvaj Respondoj de Francisco Wechsler



Francisco S. Wechsler

Demando

Kiun rolvorteton uzi post la verbo *preferi*? Ĉu *preferi kafon al teo*? Ĉu *preferi kafon ol teon* (kun akuzativo?)? Ĉu *preferi kafon anstataŭ teo*? Ĉu *preferi kafon sed ne teon*?

Respondo

Tiaj frazoj ĉiam konsistas en komparo inter du ideoj: unu preferata kaj la dua malpreferata. Ĉiuj formoj menciitaj, escepte de la lasta, estas plene akceptataj. Krome ankaŭ uzeblas la prepozicio *antaŭ*. Jen kelkaj ekzemploj el la verkaro de Zamenhof:

[...] *mia edzino preparas manĝojn, kiujn mi certe **preferas al** la manĝoj el la kuirejoj de la plej bonaj hoteloj.* (*Fundamenta Krestomatio*)

[...] *kaj konadon de Dio Mi **preferas ol** bruloferojn.* (*Malnova Testamento*)

*La aliaj anasoj **preferis** naĝadi en la kanaloj, **anstataŭ** viziti ŝin [...].* (*Fabeloj de Andersen 2*)

*Sed Li ne atentis la vizaĝon de princoj, Kaj ne **preferas** riĉulon **antaŭ** malriĉulo [...]* (*Malnova Testamento*)

Aldone: ankaŭ la lasta ekzemplo ŝajnas al mi akceptebla, kvankam mi ne trovis ekzemplojn pri ĝi en la literaturo. Vi trovos pliajn klarigojn en la *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG).

Memoru, ke en Esperanto ne ekzistas striktaj reguloj pri kombinado de verboj kun prepozicioj. Tio dependas de la signifo, kiun oni celas esprimi, kaj ankaŭ, kompreneble, de la tradicio.

Quer aprender Esperanto?



pma.esperanto.org.br